

Pri la jubileo Louis Pergaud

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 549/86-2, 1982 januaro 14 kaj 16.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1981-86/SRI-1982-86-2-549-Claude-kaj-Andree-GACOND-Pri-la-jubileo-Louis-Pergaud.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Komence de la jaro 1982 ni dediĉos serion da elsendoj al la franca verkisto Louis Pergaud, la aŭtoro de la romano LA BUTONMILITO. Li naskiĝis la 22-an de januaro 1882 en Belmont, vilaĝeto situanta inter la urboj franca Besançon kaj svisa La Chaux-de-Fonds. Ĝuste pri la vivo en tiu ĵurasa montaro li raportas en siaj noveloj kaj romanoj, kies herooj ne estas kiel kutime pli aŭ malpli feliĉaj seamantoj, sed bestoj de la arbaro aŭ de la vilaĝo, infanoj, adoleskantoj, ĉasemaj kaj drinkemaj kamparanoj kaj la malfeliĉaj edzinoj de tiuj ne tre modelaj vilaĝanoj.

A.- En tiu priskribo tre naturalisma de rimarkinde karakteriza regiono troviĝas nenia tendenco al regionismo. La unua verko de Louis Pergaud, la novelaro pri la bestoj de la arbaro titolita en la franca : DE GOUPIL A MARGOT tuj famiĝis en 1910 pro la ricevo de la premio de la Akademio Goncourt. Du jarojn poste la romano LA BUTONMILITO pravigis la juĝon de la akademianoj pri la originaleco kaj vigeleco de la nova talento. Kvankam profunde ligita al sia devena regiono, Louis Pergaud havis verkistan mesaĝon neniel folkloran. Li volis rigardi al la naturo kaj al la kamparana vivo kun veremo kaj takto. Ne plu estas urbano, kiu transformas la provincan mondon laŭ siaj antaŭjuĝoj, sed homo restinta sovaĝe kamparana - eĉ se li devis instaliĝi en Parizo por pergajni la vivon,- kiu skribas. Kaj li malkovrigas tutan mondon, kiu havas propran kaj memstaran konduton, eĉ se la tradicio volis, ke la beletristoj ĝin ignoru aŭ deforme pentru.

Cl.- La romano LE ROMAN DE MIRAUT, kiu raportas pri la profunda kaj reciproka amo, kiu nedisigeble unuigas ĉasiston kaj hundon, estas unu el la plej originalaj verkoj de la franca moderna literaturo. Tiu psikologia studo restos eterne aktuala, ĉar la ĉasistoj kaj la ĉashundoj, eĉ se la pafiloj kaj vestaĵoj aliĝas, restas same intime ligitaj unuj al la aliaj pro sammaniera alfronto de la natura vivo.

A.- Louis Pergaud estis promesplena verkisto. Sed fakte nur kvar jarojn li havis por sin esprimi. Kiam li eldonis sian BUTONMILITON, li certe ne antaŭvidis, ke tri jarojn poste li heroe kaj mizere pereos sur vera batalkampoj apud Verdun, kaj ke inter la putrantaj kadavroj lian korpon oni neniam rekonos.

Cl.- Lia lasta beletra mesaĝo estas emociigaj leteroj, kiujn li tagon post tago skribis al sia edzino. Tra ili viviĝas lia dramo de soldato obea sed pli kaj pli klarvida pri la senceleco de la travivata milito. Taktplene li kaŝas parton de siaj suferoj al la karulino, kiu senpacience atendas liajn vivsignojn.

A.- Pri tiu mallonga verkista kariero, pri la noveloj kaj romanoj rezultantaj el ĝi, kaj pri tiuj leteroj el la militfronto, ni parolos dum tiu ĉi vintra sezono, ĉar Kultura Centro Esperantista partoprenos la celebradon de la jubileo Louis Pergaud, kiun ekfestos la 22-an de januaro la lanĉo de speciala poŝtmarko fare de la franca poŝto.

Cl.- Unu el la celoj de Kultura Centro Esperantista kaj de ties Internacia FERIA Altlernejo estas la organizado de kursoj kaj kolokvoj pri la INTERPOPOLA KONDUITO. La BUTONMILITO estas verko, kies trastudo vekas interesajn diskutojn ĝuste pri la ĵus menciita temo, tial naskiĝis la ideo, ke por Kultura Centro Esperantista unu el la plej indaj manieroj kuncelebradi la Jubileon Louis Pergaud estos donaci al la mondlingvanoj la eblecon legi la romanon LA BUTONMILITO.

A.- La esperantigon de tiu ĉi vortare sufiĉe kompleksa verko entuziasme kaj talente verkis Roger Bernard kaj nuntempe presiĝas la libro sub formo de grandformata volumo belege ilustrita fare de la pentristo Claude Lapointe. Kun granda respekto por la roman-scenoj mem kaj por la epoko kaj loko, kiujn ili priskribas, la ilustristo kreis kvazaŭ teatran dekoron, en kiu la luktoj de la defendantoj de la longeverna honoro akiras neordinaran realecon. Ni ne dubas, ke tiu luksa esperanto-libro alportos originalan noton en la festado de la jubileo Louis Pergaud.

Cl.- LA BUTONMILITO estas fakte verko de pedagogo. En ĝi Louis Pergaud - kiu ĝuste ekkarieris kiel instruisto en la vilaĝo Landresse, kiun li nomas Longeverne en la romano - detalege raportas pri la ne tre enviinda sorto de la infanoj. Ilin la plenkreskuloj konstante agresas. Ĉiopova instruisto regas super ili per minacoj kaj punoj, trudante al la timigitaj kaj tamen ribelemaj instruatoj konojn neniel adaptitajn al la realaj bezonoj de junaj kamparanoj. Familie la rilatoj ne estas multe pli altkvalitaj. La gepatroj malmulte interesiĝas pri la realaj bezonoj de siaj idoj. Ili nur perforte trudas al ili absolutan obeemon. Kaj saman konduton predikas la pastro en kunsidoj matenaj kaj vesperaj, kiujn eĉ la nekredantoj ne kuraĝas ne frekventi. Kaj la ĝendarmo spionas tiujn persekutatajn infanojn ĝis en la arbaro, kie ili rifuĝas bande por liberigi sian agresemon. Tion ĉi ili faras atakante la samaĝulojn de la najbara vilaĝo Velrans. Kaj ni travivas heroajn batalojn kiuj, kiel en la legendoj, komenciĝas per interŝanĝo de teruraj insultoj. Sed subitaj ŝtonĵetoj igas la militludojn seriozaj kaj danĝeraj. Ĉio tio fortikigas la grupan vivon.

A.- LA BUTONMILITO de Louis Pergaud estas vera sociologia studo. En ĝi la infanoj evoluas, kiel membroj de komunumo, kiu posedas proprajn leĝojn, apartan moralon kaj interkonsentitan hierarkion.

Cl.- La instruistoj, la gepatroj, la pastro kaj eĉ la ĝendarmo kondukas al la hodiaŭaj infanoj kun pli da respekto, verŝajne parte pro la pozitiva influo de la BUTONMILITO. Tamen tiu ĉi romano neniel malaktualiĝis, eĉ se la infanvestoj preskaŭ perdis ĉiujn siajn butonojn. Ni vivas nun en la zipa civilizo. La libro restas aktuala kaj universala, ĉar ĝi revivigas al la plenkreskuloj ilian propran infanaĝon. Eĉ se ili ne same vikle kaj heroe batalis, kiel la soldatoj de Longeverne, ĉiu el ili havas en sia vivo kaban-periodon, sonĝon pri defendenda trezoro, rememoron al iom sekretaj konversacioj pri la mistero de la alia sekso kaj precipe deziron aparteni al potenca armeo, kiu donas la eblon sin venĝi kontraŭ la malŝatantaj plenkreskuloj kaj lukti kontraŭ la samaĝuloj.

A.- Ĉion tion LA BUTONMILITO, kiu ne estas romano porinfana, sed priinfana, helpas revivi kun humuro kaj rabelezaj ridoj. La venontajn semajnojn ni laŭtleĝos al vi kelkajn erojn el tiu baldaŭ aĉetebla libro, esperante, ke vi kunridos.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond ekraportis pri la Jubileo Louis Pergaud. Ĝis reaŭdo!